Arbetet på EsperantoCentro sköts av ett litet antal personer, som frivilligt och obetalt ställer upp på sin fritid. Anita Lindblom är huvudansvarig. Sedan ungefär ett och etthälvt år finns dessutom en betald AMS-yrpling, som arbetar på halvtid. Den nuvarande är inte esperantist.

Lokalen är öppen måndagar-torsdagar kl. 17-19 och lördagar kl. 10-12. Är det bra så? Lördagsöppnandet kom till med tanke på icke-stockholmare, som kunde befinna sig i staden över veckoslutet och ville göra besök. Besöksfrekvensen är emellertid mycket låg på lördagar. Är det för tidigt?

Vi har försök få flera personer att hjälpa till under öppettiden, det gäller alla dagarna. Arbetet under öppettiden består mest i att ta emot telefonsamtal och besök med förfrågningar och beställningar, som sedan effektu-

eras av dem som arbetar där mera regelbundet, samt i någon mån försäljning av böcker i lager.

Arbetet är därför enkelt men även många gånger intressant. Man får åtskilliga tillfällen, då man känner sig ha gjort en insats för esperanto.

Tyvärr har vi inte lyckats i vår strävan att få flera medhjälpare. Om någon ordinarie »vakthavare» får förhinder är man för det mesta tvingad anlita någon annan »ordinarie», som alltså får sätta till ytterligare fritid.

Vi hör mycket sällan från medlemmarna med synpunkter på EsperantoCentro, varken ros eller ris, i varje fall nu när utgivningen av La Espero fungerar.


Kan inte just du höra av dig? Kom gärna med förslag och önskemål och ideer. Och naturligtvis helst lösningar på dina förslag.

Ett förslag har vi själva: Den som kan göra sig loss för några dagar eller kanske en hel vecka med avsikt att sysselsätta sig på EsperantoCentro, tag kontakt med oss, och vi ska se till att du ska få göra en värdefull insats för vår rörelse.

## La loko

Ni ne prezentos Rimini al vi, ĉar ĝi estas tre renoma turistejo kaj vi certe jam aŭdis pri ĝia ĉarmo (kaj varmo). Normale en aprilo jam eblas naĝi en la maro kaj ĝui belan veteron, ekskursi al belaj lokoj en la ĉirkaŭaĵo (kiel la mikra sendependa ŝtato Sanmarino, unu el la plej malgrandaj de Eŭropo), aŭ bicikli en la Romanja ebenaĵo. Tie tuta hotelo estos je nia dispono por festivali, nome manĝi, dormi, kunsidi, babilo, diskuti, amuziĝi, spekti koncertojn ktp.

Aliĝilojn vi ricevos de: IEJ — Itala Esperantista Junularo, Cas Post 210, I-56100 PISA, Italio.



Amikeco trans limoj

*Internationella Vänskapens Vecka har lanserats av Esperanto-rörelsen, vars ideal är förståelse och vänskap över gränserna.*

# La instruistoj planas por 1984 — 1987

## Internacia Lerneja Semajno

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kiu havas sekciojn en multaj landoj, i.a. en Svedujo, organizos Internacian Lernejan Semajnon (ILS) aŭ aŭtune 1986 aŭ printempe 1987. Mi citas el la speciala invitilo:

»La kontribuo de ILEI al la Jubileo Jaro estos la prezentado de Internacia Lerneja Semajno (ILS).

Estos demonstrande, ke per Esperanto eblas organizi senprecedentan lernejan instruadon al infanoj kaj pli aĝaj gelnantoj el kvin kontinentoj kaj krei inter ili tiun etoson kiun ebligas komuna lingvo.

Partoprenrajtaj estas junaj homoj kiuj atingos 1986/1987 la aĝon inter 10 kaj 15 jaroj, escepte ankaŭ, se ili limiĝos 1986/1987 al 9 aŭ 16 jaroj. Partoprenontaj internaciaj lernejoj havu la lingvan nivelon postulatan en lingvaj ekzamenoj por lingva kapableco.

De ili devas esti plue postulata, ke ili laŭ konduto estu la »ambasadoroj» de siaj landoj.

Invitataj estas infanoj kaj gelnantoj el ĉiuj kontinentoj kaj landoj. La nombro de la ILS estas limigita al 80 ĝis 90 lernejoj.

Jam nun estas bonvenaj ĉiuj geinstruistoj el ĉiuj kontinentoj kaj landoj dezirantaj ekde nun kunlabori por la sukcesigado de la ILS, ĉu ili nur zorgu en la propra lando por la preparo de la gelnantoj aŭ ĉu ili deziras instrui en la ILS.

Ĉiuj formos la Internacian Kolegion (IK).»

## Internacia Printempa Semajno

La franca sekcio de ILEI organizos la 10an Internacian Printempan Semajnon de la 1a ĝis la 7a de aprilo 1984. La programo enhavas infanrenkontigon (kursoj, redaktado de staĝogazeto, distraĵoj) kaj diskutrondon pri lingvoinstruado.

Estas bonega okazo por sperti internacian etoson kaj uzi nian komunan lingvon. La renkontigo okazos en la kastelo Gresillon, Francujo.

## Célestin Freinet

La franca sekcio de ILEI ankaŭ eldonis unu el la verkoj de la franca pedagogo, Célestin Freinet (1896 — 1966), *La diroj de Mateo*. Tiu libro, 176-paĝa, per siaj saĝaj vortoj, invitas al pli taŭga, pli efika kaj pli moderna pedagogio. Ĝi enhavas konsilojn por instruistoj kaj gepatroj, ĝi estas propagandilo en esperantistaj kaj ne-esperantistaj medioj.

Ĝia realigo estas frukto de multthoma kunlaborado; ĝia apero, kaj espereble ĝia bona disvendado devas doni ankoraŭ pli valoran konsideron al la esperantistoj jam laborantaj en la kadro de la internacieca FREINET-movado. Jam okazis, ke esperanto estis laborlingvo en la tiel nomataj »RIDEF», internaciaj renkontigoj de Freinet-instruistoj.

Lastatempe la sekcio eldonis legolibreton 56-paĝan. Ĝi enhavas rakonton »Kiel Bretono iĝis reĝo de Anglujo», kaj tri eltiraĵojn samkarakterajn el grava libro *La fiero-ĉevalo*, de Per Jakez Helias, kiu verkas siajn librojn bretone kaj france. La tradukinto ankaŭ prezentas la nunan situa-


## Ĉeĥa Esperanto- Asocio invitas ...

En Pardubice, kiu situas 100 km oriente de Praha, okazos inter la 23a kaj 25a de marto 1984 la VI-a porpaca kunveno de geesperantistoj kaj simpatiantoj de Esperanto. De jaro al jaro kreskas la intereso pri tiu aranĝo.

Oni loĝos kaj manĝos en studenta hejmo kelke da metroj de Kultura Domo Dukla, kie la aranĝo okazos.

Prezo por loĝado kaj manĝo dum du tagoj estas 65 guldenoj.

Aliĝadreso: Jilska 10  
11001 PRAHA  
Ĉeĥoslovakio.



cion de la bretona lingvo kaj mapon pri la keltaj lingvoj. La ilustraĵojn verkis junaj anoj de la esperantogrupo en Hennebont.

## Internacia konferenco

La 18a Internacia Konferenco de ILEI okazos inter la 14a kaj la 21a de aŭgusto 1984 en Škofja Loka, 20 km nordokcidente de Ljubljana en Jugoslavio, en moderna lerneja centro kun tre bona studenta hejmo.

## Sveda sekcio

Se iu el la supre menciitaj eventoj aŭ libroj interesas vin, turnu vin al la sekcio de la Sveda sekcio de ILEI Bertil Andreasson, Södra Rörum, 242 00 HÖRBY.

# Internacia Pupteatra Festivalo en Zagreb 5—9 oktobro 1983

Kun entuziasmo ni ekstudis la internacian lingvon, esperante partopreni en la Zagreba festivalo. Multaj cirkonstancoj (precipe subitaj turneoj) faris ke niaj lecionoj estis iom malregulaj. Antaŭ nia ekveturo al Zagreb nia instruisto estis sufiĉe malkontenta kaj dubema. Sed ni promesis al li, ke dum la vojaĝo en nia teatra aŭtobuso ni absolute certe finlernos niajn rolojn kaj li ne bezonos honti pri nia (ne)kono de esperanto. Fakte dum la 36-hora veturado ni ripetis kaj ripetis kaj ripetadis ...

En la festivalo partoprenis krom la sveda ankaŭ pupteatroj el Bulgario, Francio, Hungario, Pollando, Japanio kaj Jugoslavio. El tiuj prezentis en esperanto nur la grupoj hungara, japana, bulgara kaj sveda.

Ni prezentis la fabelon de H.C.Andersen »La fajrilo» (Eldonet). Neniam ni ludis tiel senerrare kaj glate ... Ni mem sentis ke la prezentaĵo estis bona, kaj kiam poste la internacia ĵurio atribuis la unuan premion pro »la kvalito de esperanto sur la scenejo» al la

pupteatro TOTEM el Uppsala, nia feliĉo estis kompleta. La duan premion ricevis la ŝtata pupteatro el Tolbuhin (Bulgario) pro la prezentaĵo »Kiam ekfloras lekanto». La premion »Tibor Sekelj» la ĵurio atribuis al la prezentaĵo »La etulo Issumboshi», plenumita de la pupteatro el Nagoya (Japanio) pro »la plej humana mesaĝo». La premion »Jozefo Petrin» por »la plej bona efektiva kono de esperanto» ĝi atribuis al Roberto Banky el la ŝtata pupteatro en Budapeŝto. Fine la internacia infana ĵurio konsistanta el 10 infanoj el Hungario kaj Jugoslavio, atribuis la unuan premion al la prezentaĵo »La fajrilo», kiun plenumis la sveda pupteatro TOTEM el Uppsala pro »la plej bona adaptigo por infanoj».

Ekster la Festivalo la jugoslavia televido aĉetis la »Fajrilon», kiun ni surbendigis por posta prezento en la televido. La sukceson ni devas danki al nia instruisto de esperanto, Eugen Rytenberg, kiu ankaŭ tradukis la fabelon, kaj kiu ne nur instruis al

## Pupteatra Festivalo Raporto de Märtha Andréasson, kiu ĉeestis

Pupteatra Internacia Festivalo estas kultura aranĝo kun esperanto kiel oficiala lingvo. Dum 16 jaroj oni en Zagrebo ĉiujare aranĝis ĝin. Dum ĉi tiuj 16 jaroj oni tie prezentis pli ol 1000 pupteatraĵojn.

Ci-jare grupo el Svedio partoprenis kaj gajnis la unuan premion. Estis la pupteatro »Totem» el Uppsala, kiu gajnis eĉ tri premiojn:

1. unuan premion por »la kvalito de esperanto sur scenejo»,

2. unuan premion de la internacia infana ĵurio.

Ambaŭ tiuj premioj estis por la prezentaĵo »La Fajrilo».

3. diplomon por flegado de opero en pupteatro en la prezentaĵo »Madame Butterfly».

La pupteatra festivalo en Zagreb estas institucio, kiun ni devas multe pli atenti. Vizitu ĝin, vi certe ricevos tie stimulon kaj intereson por tiu kultura branĉo, kiu por multaj estas nur iu infana ludo, kio ĝi fakte tute ne estas.

Kaj la pupteatra grupo en Uppsala »Totem» volonte venos al via urbo kaj ludas. Eble kelkaj kluboj povos interkonsenti pri turneo. Estos ebleco al neordinara programpunkto en la esperantokluboj. La adreso de la grupo estas Teater Totem, S:t Persgatan 22, 753 29 UPPSALA.

Pli da informoj vi ankaŭ povos ricevi de la Esperantoklubo en Uppsala.

ni la internacian lingvon en rekorde mallonga tempo, sed ankaŭ per sia fervoro devigis nin al tiu fortostreĉo, kiu kondukis nin al la sukceso.

*Vojo Stankovski*

*Lilian Gustafsson*

*Andrzej Dziedziul*

geaktoroj en la pupteatro TOTEM,  
Uppsala

## VÄNSKAPENS VECKA

firas över hela världen sista veckan i februari.  
Affischer, brevmärken och kortbrev finns till försäljning hos  
Esperantoförlaget, Malmö, postgiro 578 - 5.

### VÄNSKAPENS VECKA

Affisch	8 kr
Brevmärken, 5 ark	7 kr
Postkort, 10 st	8 kr



Amikeco trans limoj

Många penninggåvor har flutit in under 1983. Ni skall veta, kära givare, att vi är mycket glada för detta, och tackar er varmt.

Omkostnaderna stiger som vi alla vet. Hyran på EsperantoCentro har gått upp med nära 700 kr per kvartal. Telefon och porto är dryga kostnader. Papperspriserna bara stiger. Vår anställde på EsperantoCentro kostar oss en del, trots att vi får 75 % av lönen täckt från AMS.

Som ni förstår är vår verksamhet mycket beroende av ert stöd. Här nedan redivisar vi insamlade medel under 1983. Dessutom har skänkts gåvor till ej uttalade ändamål.

## Klubo Cent

Sune Alm, Vänersborg  
Märtha Andreasson, Kungälv  
Ivar Andersson, Hälleforsnäs  
Anna Ericson, Sundsvall  
Karl E Gustafsson, Bergvik  
Gävle Esperantoförening  
Ragnar Hjort, Stockholm  
Alice Johansson, Norrköping  
Nils Johansson, Norrköping  
Signhild Johansson, Kalmar  
Tore Johansson, Kalmar  
Ove Kleborgh, Hässleholm  
Ljungby Esperantoklubb  
E Nilsson, Malmberget  
Gustav Nygård, Göteborg  
Ulf Ribers, Motala  
Jan Strönne, Malmö  
Sven Sundin, Växjö  
Erik Swärd, Malmö  
Sven Uno, Motala  
John Wik, Kalmar  
Hellevi Zackrisson, Linköping  
Dagmar Malmsten, Göteborg  
William Malmsten, Göteborg  
Sammanlagt kronor 2.410:--.



## Löneinsamling

Nynäshamns Esperantoklubb  
Henry Almar, Uddevalla  
Södra Distriktet av SEF  
Anna Eriksson, Sundsvall  
Malmö Esperantoklubb  
La Guto, Göteborg  
Kumla Esperantoklubb  
Kalmar Esperantoklubb  
Hallsbergs Esperantoklubb  
Arthur Eriksson, Hjo  
Kerstin Kristofersson, Stockholm  
Anonym  
Ulla Luin, Tyresö  
Märtha Andreasson, Kungälv  
Signhild Johansson, Kalmar  
Tore Johansson, Kalmar  
Linnea Edzenius, Nybro  
Kungälv's Esperantoklubb  
Borlänge Esperantoklubb  
Ragnar Hjort, Stockholm  
Skövde Esperantoklubb  
Einar Nilsson, Herrljunga  
Sammanlagt kronor 7.150:--.

De la 15a ĝis la 28a de aŭgusto 1984 en la pitoreska ripozloko Miedzygórze en Sudety-montaro okazos la 3a Internacia Familia Feriado »*Esperanto hejmo*«. Ankaŭ unuopaj esperantistoj estas bonvenaj, sendepende de aĝo kaj familia stato.

En la programo: fundamenta kurso por komencantoj, konversaciaj kursoj, lingvaj ludoj por infanoj, multaj montaraj piedekskursoj, maskobalo, internacia vespero ktp.

De la 1a ĝis la 14a de septembro 1984 en la montara ripozloko Miedzygórze okazos la 20a Internacia Esperantista Feriado »*La Ora Pola Aŭtuno*«. En la programo: diversgradaj konversaciaj kursoj, prelegserio pri Esperanto-movado, kultura kaj distra programo en Esperanto, montaraj piedekskursoj, ĝojfajro ktp.

Detalaj informoj pri ambaŭ eventoj riceveblaj de: Pola Esperanto-Asocio, P.O. Kesto 16, PL 50-952 Wrocław 17, Pollando.

*Amy Nilsson ber...*

## Hjälp mig hjälpa!

Sinjoro D. B. Jesudasan, ledaren för den enda esperantogruppen i Colombo, Sri Lanka, har råkat ut för gerilla tamiler.

Han och hans familj fick fly med bara kläderna på kroppen till tältlägret efter att hela hans hus och bil förstörts. Han blev nyligen pensionär, och ingen annan i familjen har arbete. Ingen försäkring betalar för tumultet.

Han ber esperantister hjälpa till att återställa ESPERANTORUMMET med dusch, toalett. Detta skulle kosta 1.230 dollar. Esperantister på besök får bo gratis hos honom, då kontakter med andra esperantister från andra delar av världen är så viktiga för dem.

Amy hoppas flera vill hjälpa... att ge efter förmåga. Bidrag kan sändas till Amy Nilsson, postgirokonto 15 02 20-0189.



## Ne timu la literon H!

La internacia lingvo posedas plej logikan kaj oportunan ortografion. Por ĉiu fonemo ekzistas aparta litero. Tio estas dank' al la supersignitaj literoj. Sed ofte leviĝas la demando pri forigo de tiuj supersignoj. Lastatempe de komputoristoj. Oni jam proponis diversajn novajn ortografiojn. Aliaj kontraŭargumentas ke nuntempe oni ĉiam povas trovi iajn supersignojn uzeblajn, kaj ke oni ne aĉetu al si komputoron nekapablan produkti supersignojn. Ek de la unua tempo ni disponas pri metodo anstataŭigi laŭbezone la supersignojn. Temas pri la litero H. Laŭ *La Fundamento* oni rajtas skribi ch, gh, hh, jh kaj sh anstataŭ ĉ, ĝ, ĥ, ĵ kaj ŝ. Kaj simple neuzi la hoketon de ŭ.

Ĉu ni bezonas tiun skribmanieron nuntempe?

Multaj aĉetas al si, aŭ estas devigataj uzi, iun komputoron sen supersignoj. Ĉu oni diru al la komputora ekrano ke ĝi ŝanĝiĝu? Ĉu oni iru al sia superulo en la laborejo postulante ke la firmao aĉetu novan komputoron kun supersignoj? Ĉu oni propramane rekonstruu sian DYMO-maŝinon nehavantan supersignojn? Ĉu oni bojkotu la svedan telekompanion ĉar ne eblas sendi telegramon kun supersignoj?

La respondoj estas evidentaj. Ni kompreneble uzu la fundamentan skribmanieron per H kiam supersignoj ne troveblas. Sed estas problemoj. La lernoli-

## Viroj: nuloj aŭ uloj

En *La Espero* 7—8/1983 s-ro Markheden pledas por la enkonduko de speciala sufikso por la vira sekso. Efektive tiu ideo estas tre malnova. Zamenhof skribis en »*La Esperantisto*» (marto 1894): »Kelkaj amikoj proponis, ke ni enkonduku apartan sufikson por substantivoj speciale viraj. Pripensinte tiun ĉi proponon, mi trovis ke ĝi estas ne sole tre logika sed ankaŭ tre oportuna. 'Fratiro' ekzemple signifus tiam speciale fraton, kaj 'fratino' speciale fratino, dum 'frato' signifus simple infanon de tiuj samaj gepatroj (aŭ frato, aŭ fratino).»

broj kaj la kursgvidantoj ne informas siajn lernantojn ke tiu skribmaniero ekzistas. Ni havas grandan grupon da junaj (kaj pli aĝaj) esperantistoj kiuj ne scipovas sendi telegramon en esperanto, kiuj ne povas uzi komputoron esperantlingve, kaj kiuj eĉ ne scias tajpi esperantan tekston per kiu ajn tajpilo.

Foje aperas tekstoj en esperanto en la gazetoj. Ne ĉiuj gazetoj povas doni cirkumfleksajn kaj hoketon. Ĉu oni en tia okazo publikigu difektitan kaj nekorektan tekston sen supersignoj? Tio ja okazas ŝoke ofte. En tiaj okazoj ne hezitu uzi la fundamentan skribmanieron per H! Kaj nepre instruu ĝin al viaj lernantoj. Ili rajtas koni ĝin. Se vi ial ne samopinias, sendu al mi telegramon en esperanto donante viajn argumentojn!

Bertil Wennergren

Sågargatan 18

S-116 36 STOKHOLMO

Tamen ne estas facila afero trovi taŭgan sufikson, pro la simpla kaŭzo ke la hindeŭropaj lingvoj ne posedas tian por la maskla sekso. Ofte oni ŝanĝas vokalon por marki inan estaĵon (kiel en la itala *ragazzo* 'knabo' : *ragazza* 'knabino') — procedo nepensebla en esperanto, kie la vokaloj ludas alian rolon. Aŭ oni, ĝuste kiel en esperanto ĝisnuna, kontentiĝas per ina sufikso. Ni povas diri, ke la malesto de sufikso (t.n. nul-sufikso) signifas la masklan estaĵon: do *kok-Ø* kontrastas al *kok-in* (rimarku, ke *kok-Ø* ne estas, el lingvistika vidpunkto, identa kun nura *kok-*, kiu signifas la bestospecion ĝenerale).

Pro tio aperis amaso da kandidatoj-sufiksoj, el kiuj neniu estas tre kontentiga. *IR* (evidente el *vir-*) do povas pretendi zamenhofan apogon. *IC* povas esti ekstraktita el la kontrasta paro *ĉj* (vira) : *nj* (virina); ĉar enestas *-n-* kiel elemento ankaŭ en *-in-*, oni povas krei analogan *-iĉ-*. *UR* (el taŭro?) estas laŭ la proponinto (Oskar Svantesson) »forta, eĉ iom bruta«. Sed, kiel rimarkigis G Staberg en *Mundo*, ekzistas multaj esperantaj radikoj finiĝantaj per *-ur*, kaj neniu el ili signifas viran estaĵon; do povus esti maloportunaj senckolizioj. *IM* (kun 'm' por 'masklo?') estas paralela al *-in-* sed multe tro simila al ĝi. Ido por la dirita celo uzas 'ul': »ul estas mallongigo de *maskulo*, same kiel *in* estas mallongigo de *femino*» deklaras de Beaufront.

Se oni volas enkonduki novan sufikson, ĝi devus laŭ mia opinio esti kiel eble plej diferenca de *-in-*

# Poŝtmarka serio

## »Muziko en Svedio«

La 1a de oktobro estis fare de la muzikkonsilantaro de Unesco (IMC) proklamita kiel Mondmuzika tago, kaj ĉi-jare ĝi estis solenata en Stokholmo konekse kun la ĝenerala asembleo de IMC (International Music Council), kiu okazas ĉiun duan jaron. La sveda poŝta administrejo samtempe eldonis »miniblokon« kun kvin poŝtmarkoj. La motivoj reprezentas muzikon en Svedio dum la lastaj cent jaroj:

### Folkloro muziko

La violonisto estas pentrita de

, do kun vokalo kaj konsonanto aliaj. El tiu vidpunkto *UL* estas ideala, kaj ĝi povas esti iomgrade motivita per la — certe ne esperanta! — termino 'mask-ul-in' (kp. 'fem-in-in'). *UL* mem ja estas neebla, ĉar tiu silabo jam havas alian rolon, sed oni povus pripensi por ĝi normalan zamenhofan vokalsanĝon *u < o, do ol: filolo, katolo*.

Mi diris: se oni volus ... Ĉar la konsekvencoj estus gravaj por la lingvo kaj ties uzantoj: ĉu ne la radiko *vir-* fariĝus tute superflua? ĉu *virino* estus nura *ino*, aŭ *homino*, aŭ — neologisme — *femino* (kun la viro kiel *femolo*!). Ĉu ne *knabo* devus malaperi pro *infanino* kaj *infanolo*? Antaŭ tiaj konsekvencoj ĉiu esperantisto nepre hezitas. Tial ŝajnas al mi pli saĝe daŭre marki la viron kiel »nulon« (la virinoj povus preni tion simbole, tiel kontraŭpezante la asertatan diskriminacion!). Malpli revolucia solvo estus enkonduko de maskla sufikso nur por sciencaj celoj (en biologio k.s.).

Ebbe Vilborg

Anders Zorn, kiu mem estis kunaranĝanto de la unua folkloro violonista konkurso en la jaro 1906, kaj kiu en la jaro 1910 desegnis la t.n. Zorn-insignon, kiu daŭre ornamas svedajn folklorajn ludistojn.

### Klasika muziko

La paŝo de Dalekarlio kaj Zorn al la plej eminenta sveda komponisto Wilhelm Stenhammar ĉe lia propra instrumento ne estas longa.

### Opera muziko

Male, por multaj la paŝo de la ne malofte lirika elegia muziko de Stenhammar al la spacopero

»Aniara« de Karl Birger Blomdahl (Stokholmo 1959) ŝajnas sufiĉe longa.

### Jazo

Mondkonata baritonsaksofonisto Lars Gullin konstruis sian muzikan universon ne nur per impresoj de admirataj kolegoj kiel Miles Davis, Gerry Mulligan kaj aliaj, sed eble ne malpli per folkloraj muzikaj impresoj el sia hejmlanda insulo Gotland aŭ la folkloro paradizo Dalekarlio.

### »Pop«muziko

Ĉu la plej prospera muzikmaŝino ABBA ankaŭ estas deĉifrebla per svedaj kromsignoj eble estas tro frue starigita demando, sed ke ĝi havas vere propran profilon en la giganta popmuzikmondo neniu volas nei. Certa signo de malvarmeta norda tono estas unu el la plej delikataj karakterizoj de la kvarteto flanke de la dezertiga profesiismo.

## Tabulo

Zygmunt Wons, Hirszfelda 6-m20, 02-776, Warszawa, Pollando deziras korespondi pri turismo, skioj kaj li kolektas monerojn, poŝtmarkojn. Li havas 35 jarojn kaj estas inĝeniero.

Farshad Hossinkhani, Lien 217, number 6, Hafez st shahin shah, Esfahan, Irano, deziras korespondi kaj li volas interŝanĝi bildkartojn kaj poŝtmarkojn.

Erika Kovács, Budapest, 1131, str. Thälmann 22/c 118, Hungarujo, deziras korespondi pri literaturo, turismo, muziko, sporto kaj ŝi kolektas bildkartojn kaj magnetonfonkasetojn.

Pasquale Zapelli, Via De Sanctis 13, I-80023 Caivano NA, Italio, 22-jara komencanto, studento pri lingvoj kaj politiko, deziras korespondi kun svedaj gejunuloj por praktiki esperanton.

Julita Ślesieńska, Ul, Czartaków 26/1, PL-61-495 Poznan, Pollando, 19-jara studentino, deziras korespondi kun svedoj.

Om alla medlemmar i SEF värvar var sin ny medlem, fördubblas antalet!

## *Hungario invitas*

Ni invitas Vin viziti la urbon Gyula, la urbon de Somera Esperanto-Universitato, kiu la 22an fojon donas lokon por tiu bone konata aranĝo. La SEU okazos inter la 29a de junio kaj la 6a de julio 1984.

SEU estas aranĝata de la Sciencpopulariga Asocio de la dep. Békés kun la apoga helpo de la konsilio de Gyula kaj Hungara Esperanto-Asocio. La 22a SEU volas servi la esperantlingvan sciencpopularigon helpe de renomaj prelegantoj.

Niaj programeroj estas libere elekteblaj. Escepte de la ekskursoj, la partoprenkotizo entenas la koston de la programeroj. Apud la posttagmezaj programeroj Vin atendas la 73-grada kuracakvo de du 2 000 metraj fontoj, kiuj estas malvarmigitaĵ diversgrade kaj estas uzeblaj ne nur fare de la resaniĝemuloj, sed ankaŭ de tiuj, kiuj ŝatas la sunbaniĝon, baniĝon kaj naĝadon.

La Konsilantaro de  
Somera Esperanto-Universitato

La partoprenkondiĉoj:

1. La aliĝo okazos per aliĝiloj, kiujn vi povas ricevi de Kerstin Rohdin.
2. La *eksterlandaj* partoprenantoj pagos la partoprenkotizon surloke.  
Partopreno + loĝado en hotelo koston ĉirkaŭ 2 600 forintojn.  
Partopreno + loĝado en studenta hejmo koston 1 800 forintojn.

Por peti aliĝilojn aŭ kromajn informojn, turnu vin al:

Kerstin Rohdin  
Ålsta  
690 72 SKÖLLERSTA

Telefono (vespere)  
019 - 23 63 45

# DAGS FÖR UEA

Nu är det dags igen att betala årsavgiften till UEA. Gör det i god tid, så hjälper du både dig själv och UEA.

Välj rätt avgift:

**MA-medlem**, dvs medlem med både årsbok och tidningen *Esperanto*, ett måste för alla aktiva esperantister

200:—

**MJ-medlem**, dvs medlem med enbart UEAs årsbok

80:—

**SZ-medlem**, dvs medlem i *Societo Zamenhof*. Denna avgift betalas utöver ovanstående avgifter. SZ-medlem blir stödjande medlem i UEA. Vi svenskar, som har möjlighet att betala till andra länder, och som har råd att betala, kan genom denna extra avgift göra en god insats för att hjälpa den internationella organisationen.

400:—

**INDIVIDUELL MEDLEM MA eller MJ** t o m 25 år blir automatiskt medlem i ungdomssektionen **TEJO** och får utan kostnad *kontakto*. Sådan medlemmar ska anteckna MA-K eller MJ-K på inbetalningstalongen. Andra medlemmar kan prenumerera på *kontakto* för 60 kronor per år.

Inbetalning sker till postgiro 14 74 29-5, Esperantoförbundet, Specialkonto. Förfrågningar kan göras hos Asta Schaedel, V. Rönneholmsvägen 42 B, 217 41 Malmö, telefon 040-91 63 09.

## DAGS ATT BLI UEA-DELEGAT (eller fack-delegat, vicedelegat) PÅ DIN ORT

Du vill säkert medverka till att göra UEA:s delegat-system ännu effektivare. Flera orter saknar delegat, vicedelegat eller fackdelegat. Tag gärna del av bestämmelserna i UEA:s årsbok eller gör förfrågan hos s-ino Asta Schaedel, V. Rönneholmsvägen 42 B, 217 41 Malmö, tel. 040-91 63 09. Där kan Du få blanketter, som sedan skall sändas tillbaka till samma adress. Anmäl gärna en vicedelegat på orten och intressera någon esperantist i Din förening att bli fackdelegat i något ämne. Avgiften för direkt medlemskap i UEA publiceras i *La Espero*.

Gör slag i saken.